Luiz Portella

# *Ŝi Estas Mia Amiko*

Eldonejo Pentuvio
www.pentuvio.com/ep
Braziljo — 2007

# Livros Grátis

http://www.livrosgratis.com.br

Milhares de livros grátis para download.

**Provlego** de Dmitro Lubenko (fidoretano@ukr.net),
Alberto Vuicik kaj
Fabrício Valle.
**Rakonto** de Luiz Portella (lfpor@lujz.org).

**Ilustraĵoj** de Elison Simas.
**Kompostita** de Luiz Portella kaj
Luciana do Nascimento per LaTeX.
**Bibliografia normigado** de Néia Lúcia Souza.

Libro plene kreita per **GNU/Linukso**.

**Uzo**: Vi rajtas kopii kaj distribui ĉi verkon por ne-komerca celo se vi mencias la aŭtoron, ne ŝanĝas la verkon, kaj klarigas pri ĉi uzokondiĉoj. Pri aliaj uzoj demandu la aŭtoron. La verko estas liverata laŭ licenco de Creative Commons: http://creativecommons.org/licenses/by-nc-nd/2.0/br/.

---

Portella, Luiz.
Ŝi estas mia amiko / Luiz Portella. — Braziljo : Eldonejo Pentuvio, 2007.
38 p. il.

ISBN: 978-85-60661-00-8

1. Infana literaturo 2. Junula literaturo
CDU: 087.5

---

La libro plu restas ĉe http://lujz.org/amiko/

# Antaŭparolo

Mi opinias, ke la libroj facil-legaj estas tre gravaj por la Esperanta movado, des pli se ili estas senpage legeblaj en la reto.

En ĉi libro mi uzas ĉefe morfemojn el grupoj A, B kaj C laŭ klasigo de Johansson[1]. Aliaj uzataj morfemoj ricevas klarigon fine de ĉapitro, en kiu ili aperas je unua fojo.

La gramatikaĵo de la rakonto estas simila al tiu de la libroj de Katrina[2], verkitaj de Sten Johansson. En ĉiuj ĉapitroj mi enkondukas novan gramatikaĵon. -as (tion mi enkondukas en la unua ĉapitro); -is (dua); -n por rekta objekto (tria); -u (kvara); simplaj subpropozicioj (kvina); -os (sesa); si, sia, sin (sepa); -us (oka); -ig (naŭa); -iĝ (deka). Tute ne aperas finaĵoj -ant, -int, -ont, -at, -it aŭ -ot (escepto estas la vorto "lernanto"). Ankaŭ ne estas -n por direkto. Ĉi tiuj reguloj validas por la teksto, ne por la klarigoj fine de la ĉapitroj.

Por la klarigo de la vortoj mi unue uzis la vortaron Baza Esperanta Radikaro (BER), de W. F. Pilger. Due mi uzis la vortaron ReVo. Mi mem metis difinon por kelkaj vortoj.

Se vi pensas, ke la titolo de ĉi rakonto esta erara (eble iu misinstruis vin), jen la difino de la vorto "amiko":
— **BER**[3], Pilger: ŝatata, kara homo.
— **ReVo**[4]: persono, amata kaj amanta, kiu estas korligita kun alia pro inklino sed ne pro seksamo, nek pro familianeco.

Luiz Portella

[1] http://lujz.org/komencanto/listo.j.php
[2] http://www.esperanto.net/literaturo/
[3] http://www.pentuvio.com/baza-esperanta-radikaro-p-155.html
[4] http://purl.org/NET/voko/revo/

# Dediĉo

Al mia familio:
gepatroj Ergina kaj Luiz;
gefratoj Gilda, Inês, Joana kaj Batista.

# 1 Granda novaĵo

Lia nomo estas Mateo. Li estas okjara knabo. Li loĝas en Brazilo. Li estas lernanto je la dua klaso. Lia mondo estas la jeno: lia domo, lia lernejo, kelkaj stratoj de lia urbo kaj kelkaj aliaj domoj (de kuzoj kaj de najbaroj liaj).

Lia lernejo estas en lia urbo. Lia urbo estas grandega. Pli ol tridek mil homoj loĝas en lia urbo. Lia lernejo ankaŭ estas granda. Tamen la tuta lernejo estas en lia mondo. Estas aliaj urboj, aliaj landoj, aliaj planedoj. Sed ili ne estas en lia mondo. Nu, aliaj aferoj ankaŭ estas en lia mondo. La suno estas en lia mondo (Kiam ne estas nigraj nuboj en la ĉielo). Kio pli? La luno kaj la steloj.

Jen lia mondo.

***

Mateo estas en la lernejo. Dum la tutaj matenoj li restas en la lernejo. Nun li estas en la paŭzo. La paŭzo estas ludotempo por la geknaboj. Ili manĝas kaj poste ludas. Do ne estas leciono nun. Kutime li kuras dum la tuta ludotempo. Li kaj amikoj kuregas. Tamen en ĉi paŭzo ili ne kuras. Ili staras sur altaĵo ĉe la ĉirkaŭmuro de la lernejo.

Flanke de ilia lernejo estas vaka terpeco. Tie preskaŭ ĉiam estas

herboj. De la altaĵo ili rigardas al la terpeco. Kia novaĵo! Tie laboras homoj kaj maŝinoj. Tie estas bestoj en kaĝoj. Tre granda novaĵo!

— Jen cirko! — Marcelo krias.

— Ĉu? Kie estas la pajacoj? — Mateo demandas.

— Ja! Kie ili estas?

La sonorilo sonoras. Ili reiras al la klasĉambro. La tempo pasas malrapide. Finfine ili povas eliri. Dum eta tempo Mateo rigardas al la terpeco. Li rigardas al granda malordo. Tie estas neniu pajaco. Eble la pajacoj dormas ie ajn. La bestoj plaĉas al li. La homoj plu laboras. Nu, ne nur granduloj laboras tie. Tie laboras ankaŭ du infanoj.

Li memoras pri la horo. Li ne plu povas resti. Tiam li foriras.

Li estas tre gaja pro la granda novaĵo.

**Brazilo** la plej granda lando de Sud-Ameriko.
**cirko** [**1**] rondforma, ĉirkaŭfermita loko, por rajdaj, akrobataj kaj distraj spektakloj; [**2**] artista grupo, ordinare migra, kiu prezentas homajn aŭ bestajn akrobataĵojn kaj ceterajn distraĵojn.
**herbo** planto sen lignecaj partoj.
**kaĝo** kvazaŭ skatolo el metalfadeno, stangoj metalaj aŭ lignaj. (ekzemple kiel loĝejo aŭ tenejo por bestoj aŭ birdoj).
**leciono** parto de instruado; pli-malpli horo da instruado.
**luno** natura satelito de Tero (ĝi lumigas Teron dum la nokto).
**najbaro** homo, kiu loĝas apude.
**pajaco** foira grimacisto; gaj-ig-isto.
**paŭzo** nelonga interrompado de ago.
**terpeco** peco de tero.
**vaka** libera; disponebla.

# 2 La familio, la amikoj kaj la strato

Preskaŭ ĉiuj amikoj de Mateo estas najbaroj liaj. Kelkaj najbaroj iras al lernejo matene, kiel li. Aliaj najbaroj iras al lernejo posttagmeze. Li parolas pri la novaĵo al ili. Sed tio jam ne estas novaĵo por ili. Ili jam sciis pri tio. Li memoras pri tagmanĝo. Li malsatas.

En la domo de Mateo loĝas paĉjo Leonido, panjo Eŭĵeni, li kaj du gefratoj: Bino kaj Alico. Li estas la plej juna el la gefiloj. Tie ankaŭ estas grandega korto. Ĝi estas ilia hejma kampeto. Tie loĝas ilia hundiĉo Botelego kaj pluraj gekokoj. (Pluraj kokinoj kaj du kokiĉoj. La kokiĉoj ne estas amikoj.)

La tagmanĝo estas bongusta. Eŭĵeni bone kuiras. Mateo bone manĝas.

Mateo zorgas pri la hejmaj taskoj el la lernejo post tagmanĝo. Li ankaŭ laboretas hejme post tagmanĝo. Li ĉiam ludas post vespermanĝo. Tiam la tuta infanaro ludas kune sur la strato de lia domo. Neniam estas malpli ol dek infanoj. Feliĉe estas malmultaj aŭtoj en tiu parto de la urbo. Do la strato estas nur ilia. Mateo ankaŭ ludas posttagmeze. Sed tio ne okazas ĉiam.

Hodiaŭ li iras al la laborejo de la patro. Lia patro estas vendisto. Leonido ade babilas en la vendejo. Mateo ŝatas resti tie. Li sidas kaj aŭdas. La vendejo ja estas vizitĉambro. Antaŭ la subiro de la

suno, ili revenas al la hejmo.

Mateo vespermanĝas kaj iras al la ludejo. Sur la strato ankoraŭ estas nur ses infanoj. Lia frato, Novuleto, Dia, Dentuleto, Heliumo kaj li. Novuleto kaj Dia ĉiam estis liaj najbaroj. Dentuleto loĝas en la urbo, ĉe la strato, jam de unu jaro. Heliumo ne loĝas ĉe la strato. Li loĝas ĉe proksima strato. Tie ne estas pavimo. Do li venas al la strato de la domo de Mateo.

Ilia parolo temas pri la cirko. Pli kaj pli alvenas geknaboj. Do ili komencas ludi. Hodiaŭ ili kaŝludas. En la kaŝejoj ili ankoraŭ parolas pri la cirko. Ili ankaŭ parolas pri la bestoj de la cirko. Tiam iu ajn besto estas malpli forta ol iu ajn el ili.

Sur la lito Mateo ankoraŭ pensas pri la cirko.

**babili** paroli pri ne (tre) seriozaj aferoj.
**bongusta** agrabla por la palato, por la sento en la buŝo.
**hundiĉo** vira hundo.
**-iĉo** kiel -ino, sed por viroj.
**koko** (kort)birdo.
**korto** terpeco inter aŭ apud domoj; ne-kampa parto de bieno.
**paĉjo** kara vorto por patro (pa(tro)+ĉjo).
**panjo** kara vorto por patrino (pa(trino)+njo).
**pavimo** tegaĵo el ŝtono, ligno, asfalto kaj similaj etendita sur tero de strato, vestiblo.

## 3 Novaj lernantoj

Jen la sekva tago. Du novaj lernantoj estas en la klaso de Mateo. Ofte je la alveno al la klasĉambro la instruisto apenaŭ povas eniri. Tamen hodiaŭ la lernantoj estas kvietaj. Ili estas tiaj je ĉeesto de iu ajn fremdulo.

— Ĉu vi estas novaj lernantoj? — demandas Marko.

— Jes — respondas la iĉo.

— Ĉu vi du estas gefratoj — demandas Karla.

— Ni estas — respondas la ino.

La instruisto alvenas. Ili ĉiuj sidas silente. Vera, la instruisto, ne miras pri tio. Aliaj lernantoj jam alvenis dum la jaro.

— Bonan tagon, lernantoj. Ekde hodiaŭ vi havas du novajn kolegojn, Barbara kaj Vilhelmo.

Dum minutoj ĉiuj interparolas. Vera demandas la novajn lernantojn pri pluraj aferoj. Kelkaj kolegoj ankaŭ demandas ilin. La klaso ekscias iom pri la du. Ili estas el la cirko. Ili iras de urbo al urbo kaj de lernejo al lernejo. Ili rakontas pri la vivo en la cirko.

— Ni laboretas en la cirko. Tamen ni havas tempon por ludi. Ni ankaŭ havas tempon por la taskoj de la lernejo — diras Barbara.

Tiam Mateo rigardas al Barbara. Li volegas ade rigardi al ŝi. Tamen li estas kaŝema pri tio.

Sinjorino Vera timas ion: — Iro de lernejo al lernejo certe malhelpas vian lernadon.

Je tiu tago ili lernas matematikon kaj la Portugalan. La du novaj lernantoj bone respondas ĉion. La du estas tre kapablaj. La du estas tre lertaj. En la klaso estas lernantoj tre lertaj. Ankaŭ estas lernantoj nelertaj.

Post la paŭzo ili lernas geografion.

— Tiago. Kiu estas la ĉefurbo de la Federacia Respubliko de Brazilo? — demandas Vera.

— Kio estas tio? — demandas Tiago.

— Mi ripetas: Kiu estas la ĉefurbo de la Federacia Respubliko de Brazilo? ... De Brazilo.

Tiago iom pensas. Pluraj kolegoj jam flustras: "Braziljo", "Braziljo". Do Vera parolas pri tio al Tiago:

— Federacia Respubliko de Brazilo estas la vera nomo de Brazilo. Ĝi estas respubliko ekde 1889. Ĝi estas federacia ĉar Brazilo estas ligo de 27 unuoj: 26 subŝtatoj kaj Federacia Distrikto.

— Fernando. Kiu brazila regiono ofte suferas pro manko de pluvo? — demandas Vera.

— Israelo? — respondas sendecide Fernando.

— Ĉu? — moke demandas Marko. Tiam la tuta klaso ridas.

Vera atendas silenton.

— Antaŭ nelonge ni legis pri Israelo. Kion ni legis pri ĝi?

— En Israelo oni kultivas eĉ en dezerto — Karla respondas.

— Jes. Ne nur en Israelo oni kultivas en dezerto. Tamen mi scivolas. Ĉu Israelo estas en Brazilo?, Mateo.

— Israelo estas en alia parto de la mondo — Mateo respondas.

— Ĉu ĉe Japanio? — demandas ŝerce Marcelo.

**dezerto** regiono kun tre seka tero, kie preskaŭ neniuj plantoj kreskas.
**Distrikto** teritorio kiel aparta administra unuo (ofte subdividaĵo de alia administra teritorio).
**flustri** mallaŭte paroli (por ke ne ĉiuj aŭdu).
**geografio** scienco pri la aspekto de Tero, ĝiaj landoj kaj regionoj.
**Israelo** lando kiu formiĝis je 1948 por la judoj, tamen tie vivas homoj el pluraj religioj. Tie estas Jerusalemo, sankta urbo de Judoj, Kristanoj, Islamanoj kaj aliaj.
**Japanio** lando, kiu estas aro de insulo en la oriento.
**kolego** ĉiu, kiu havas la saman oficon aŭ profesion.
**kultivi** prilabori teron por bone kreskigi utilajn plantojn.
**kvieta** tute trankvila, paceca.
**lernanto** tiu, kiu lernas.
**matematiko** scienco pri nombroj kaj figuroj, kaj ties propraĵoj.
**moke** kun moko.
**moki** diri ridigajn vortojn pri iu; (malŝate) ridi pri iu.
**portugala** (lingvo) latinida lingvo.
**respubliko** ŝtato, kies estro ne estas difinita pro heredo.
**ŝerce** kun ŝerco.
**ŝerci** diri, rakonti ion lude, ridige.

# 4 Mateo emas ege lerni

Je tiu sama tago la cirko komencis vendi biletojn por la spektaklo. Tamen Mateo ne multe pensas pri tio. Li havas grandan celon: ege lerni. Mateo volas esti inter la plej kapablaj lernantoj de la klaso.

Hejme Mateo mensogas pri la hejma tasko el la lernejo. Li elpensas pliajn taskojn. Lia patrino dubas pri la taskoj. Tamen ŝi ne zorgas pri tio. "Mi zorgu pri maltroa lernado!" ŝi pensas.

— Nun mi iras al la lernejo — ŝi diras.

Eŭĵeni laboras en lernejo. Ŝi ne laboras en la lernejo de Mateo. Ŝi laboras en alia lernejo. Ŝi laboras pri helpo al la instruistoj, kaj pri kelkaj aferoj rilate al la instruado. Tamen ŝi ne estas instruisto.

Post ĉirkaŭ du horoj da lernado Mateo decidas legi libron. Li iras al la biblioteko en la domo. Tie li vidas instruilon pri sciencoj. Tiam li memoras ion. En la kovrilo de la libro estas du flavaj kokidoj. Supre de la kokidoj estas la vorto "Sciencoj" je grandaj literoj. Antaŭ jaroj kuzo demandis lin pri la vorto.

— Mateo, legu ĉi vorton.

Mateo "legis" ĝin malrapide. Kvazaŭ li estis legopova.

— Bes-to-far-mo. Bestofarmo! — Mateo fieris.

Mateo konas gekokojn kaj kokidojn ekde ĉiam. Tamen li ne estas legopova ekde ĉiam. Mateo hontas pro la mensogo. Tial li kaŝas la libron. Li metas la libron sub aliaj.

— Ĉu mi povas iri al vendejo de mia patro? — Mateo demandas la fratinon.

— Kion vi volas fari? — Alico demandas.

— Mi devas legi revuojn por hejma tasko pri historio.

— Venu kun la patro — ŝi petas.

En la vendejo Mateo aŭdas la paroladon. Lia patro kaj kelkaj homoj interparolas. Li kelkfoje lernas pro la aŭdado.

Kiam homo alvenas al la vendejo Mateo aŭdas la demandon:

— Kia estas la batalo?[1]

Ofte sinjoro Leonido demandas tion. Oni ankaŭ demandas tion al Leonido. Pro tiu demando Mateo pensadas.

"Ĉu tiuj uloj batalas en milito? Tamen oni demandas tion ankaŭ al mia patro. Mia patro neniam forestas dum longa tempo. Do ne eblas. Mia patro ne batalas en milito! Ĉu la aliaj uloj batalas en milito? Ĉu ili sukcesis postvivi? Ĉu ili ĵus revenis el milito?"

Mateo volas demandi tion. Tamen li timas kaj ne demandas.

"Post la demando, ili ne parolas pri milito. Ili parolas pri laboro, politiko ktp. Ĉu ili volas kaŝi ion de mi?"

Mateo iras al bretaro de revuoj. Tie estas pluraj revuoj novaj por li. Li ne legas la tekstojn. La tekstoj estas por granduloj. Li nur vidas la fotojn. Foje li legas mallongan frazon. Sur la paĝoj de

[1] Brazila esprimo por demandi "Kiel marŝas la vivo?"

revuo li vidas fotojn. Estas fotoj de homoj en milito. Estas fotoj de malvivaj homoj. La fotoj estas ŝokaj por la knabo.

**biblioteko** librejo, libraro, kie oni povas legi aŭ prunti librojn.
**bretaro** aro de bretoj.
**breto** tabulo kun larĝo malpli granda ol longo; horizontala tabulo, sur kiu oni metas aĵojn.
**bestofarmo** loko kie oni prizorgas malliberajn bestojn por vendado.
**flava** kun koloro de matura citrono, kun koloro simila al tiu de oro.
**foto** fotografaĵo.
**ktp** kaj tiel plu.
**legopova** kapabla legi.
**mensogi** diri malveron.
**politiko** arto de regado de ŝtato.
**revuo** gazeto (ofte pli bele presita), aperanta unu fojon en kelkaj semajnoj, monato, aŭ jaro.
**spektaklo** atentokapta okazaĵo aŭ prezentaĵo (teatra, sporta ktp).
**ŝoka** kiu kaŭzas ŝokon.
**ŝoko** anim-skuo; subita nerva misfunkcio.

# 5 Futbalo kaj brilaj okuloj

La emo ege lerni de Mateo ne estis longa. Ja Mateo ne estas laborema pri tio. Li ne ŝatas legi, li ne ŝatas kalkuli, li ne ŝatas hejmajn taskojn. Tamen li akiras la bazan scion facile. Tial eĉ mallaboreme li sukcesas en la lernejo.

Mateo rezignis ege lerni, tamen li ne rezignis kapti atenton de Barbara.

En la paŭzoj la knaboj ĉefe kuras. En la paŭzoj la knabinoj plejofte babilas. Kelkaj knabinoj sidas kaj babilas. Aliaj knabinoj ronde staras dum babilado. Kelkaj aliaj knabinoj babilas dum promenado en la lernejo.

“Kapti ŝian atenton dum ludotempo estas pli bone ol dum la lecionoj” pensis Mateo. Do ekde tiam en la paŭzoj Mateo ĉefe zorgas pri du aferoj: kuri pli rapide ol iu ajn; fari belajn korpajn movojn en la ludoj. Li imagis scenon: Barbara rigardas knabon, kiu faras belajn korpajn movojn, dum li faras tiujn movojn, kaj... Mateo supozas, ke tiam eble ŝi kisos lin.

Nun Mateo estas ĉe Marcelo kaj Marko, liaj plej bonaj amikoj en la lernejo. La klaso ne estas en la klasĉambro. Ili estas en la sportejo de la lernejo. Ili havas lecionon pri sporto. Dum leciono pri sporto ili gimnastikas kaj sportumas. Por Mateo estas du bonegaj aferoj en la lernejo: la paŭzoj kaj la lecionoj pri sporto. La paŭzoj kaj la

lecionoj pri sporto estas ludotempoj por preskaŭ ĉiuj lernantoj.

La tri knaboj babilas en la sportejo:

— Kiu estas la plej bela knabino el nia klaso? — demandas Marcelo.

Tiu demando aperadas de tempo al tempo.

— Laŭ mi, la plej bela knabino estas Barbara — diras Marcelo.

— Barbara estas bela. Tamen mi ne zorgas pri tio. Kiu estas la plej bela knabino el la tuta lernejo? — demandas Marko — Laŭ mi, ankoraŭ estas Iracema el la kvina klaso.

— Nu, mi ne scias... — diras Mateo dum pensas pri Barbara.

— Mi kaj Barbara jam babiletis — diras Marcelo — Kaj ŝi ĉiam salutas min per rideto. Mi pensas, ke ŝi ŝatas min.

"Ŝi ankaŭ jam ridetis al mi" pensas Mateo. Mateo iomete ĵaluzas. "Kaj ŝi jam salutis min".

Vera vokas ĉiujn, kaj diras "Hodiaŭ estas tago de futbalo". Ĉiuj knaboj krias pro feliĉo. Kiam estas tago de futbalo la knabinoj ludas en alia parto de la lernejo. Do la gelernantoj ne ludas kune. Tamen Barbara petas ludi futbalon. Vera ja permesas: "La inoj ne ludas futbalon, ĉar ili ne volas. Ili ĉiam preferas danci kiam estas futbalo".

Kiam la teamoj estas pretaj, Mateo ridetas. Barbara kaj Mateo estas en sama teamo. Marcelo estas en alia teamo. Kaj alvenas duboj: kio estas pli bone?, ĉu ludi kun ŝi?, ĉu ludi kontraŭ ŝi? Kiel ajn Mateo kaj aliaj knaboj estas tre feliĉaj. Ili komencas ludi.

Barbara ekludas. Ŝiaj movoj estas belaj. Inaj movoj. Barbara

estas bela ino. Kaj ŝi bone ludas futbalon! La okuloj de Mateo brilas.

**akiri** ekhavi per faro.
**baza** plej ĉefa.
**futbalo** piedpilk-ludo; pilka ludo per la piedoj.
**gimnastiki** fari gimnastikajn ekzercojn.
**gimnastiko** arto pri ekzercado de la korpo per taŭgaj movoj.
**ĵaluza** sentanta doloran timon, perdi ion aŭ iun.
**ĵaluzi** esti ĵaluza.
**leciono pri sporto** leciono pri korpa ekzercado.
**plejofte** en plimulto de okazoj.
**rezigni** decidi ne fari ion, ne uzi ion.
**rondo** io simila al la litero "O".
**sceno** aparta parto de teatraĵo; eksterordinara okazaĵo.
**sportejo** loko por sportumado.
**sporto** korpaj ekzercoj kaj ludoj.
**sportumi** sporti; praktiki sporton.
**teamo** grupo da ludantoj de unu flanko (en ludoj, sportoj, ktp).

# 6 Promenado

Jam estas la dua semajnfino, en kiu la cirko prezentas spektaklon. Je la vendredo Mateo pensis refoje peti viziton al la cirko. Sed li ne povis paroli pri tio al Eŭĵeni kaj Leonido. Mateo dormis antaŭ ilia reveno dum la nokto.

Hodiaŭ estas sabato. Hodiaŭ ne estas lecionoj en la lernejo. Nek hodiaŭ, nek morgaŭ estos lecionoj en la lernejo. Je la komuna matenmanĝo la tuta familio de Mateo interparolas.

— Hodiaŭ ni ĉiuj iros al la cirko, ĉu ne? — demandas Alico.

— Jes! Tre bone! — krietas Mateo.

Eŭĵeni ridetas. Leonido ege malfermas la okulojn.

— Ĉu tiu cirko ne estas Cirko Hirundo? Antaŭ unu jaro ni iris al Cirko Hirundo. Ĝi estis en la sama loko, apud la lernejo — diras Leonido.

— Tiu estas alia cirko, paĉjo — dolĉe diras Alico. (Ŝi dolĉe parolas, kiam ŝi volas ricevi jeson.)

— Ĉiuj cirkoj estas samaj... — ekparolas Eŭĵeni.

— Ne!, — rapide interrompas Mateo — ĉi tiu estas teatra, kaj ĝi havas plurajn ludilojn.

— Mi scias, Mateo — pluparolas Eŭĵeni — tamen mi ne finis.

— Ĉiuj cirkoj estas samaj, tamen ĉiam ĉiuj infanoj volas iri al ili. Jen kion via patrino volis diri — helpas Leonido.

— Ree oni ne permesas min fini — Eŭĵeni parolas kun rideto.

— Parolu, parolu, kara — pardonpetas Leonido.

— Ni iros al la cirko je sekva semajnfino — diras Eŭĵeni.

— Eble tiam la cirko jam foriris — parolas Bino, kiu estis silenta.

— Mi kredas, ke ne. Se la cirko vojaĝos al alia urbo, ni ankaŭ vojaĝos al ĝi — promesas Eŭĵeni — Tamen iu informis min, ke la cirko estos ĉi tie je la sekva semajnfino.

Mateo aŭdis tion kaj estas malgaja. Alico ankaŭ estas malgaja. Bino jam iris al la cirko kun amikoj, tamen li volas reiri al ĝi.

— Kion ni faros dum ĉi semajnfino? — demandas Alico.

— Ni vizitos la bienon. Ni vizitos la geonklojn. Estos bonega promeno — respondas Leonido.

Kvar gekuzoj de Eŭĵeni loĝas en la kamparo. Kvar familioj en kvar bienoj, unu apud alia. Tamen estas granda distanco inter la kvar domoj. Oni nomas la tuton, la kvar bienojn, nur “bieno”. La bieno. Tiu promenado estas ĉiam tre plaĉa al la geknaboj. Tamen nun Mateo estas malgaja.

La distanco inter la bieno kaj la urbo estas 70 km. La plej granda parto de la vojo al la bieno estas mallarĝa ŝoseo. Ili sesope iras per aŭto al la bieno: La gepatroj, Mateo, Alico, Bino kaj Botelego, la hundo. Jam sur la mallarĝa ŝoseo Mateo ne plu estas malgaja. La vojaĝo per la mallarĝa ŝoseo estas oportuna. Dum ĝi ili povas rigardi kelkajn sovaĝajn bestojn. Ja ne estas zoo en la urbo aŭ en alia proksima urbo.

La semajnfino en la bieno plaĉe kaj glate pasis. Estis du ege bonaj aferoj por Mateo: li manĝis akvomelonon tiel multe, ke lia ventro preskaŭ krevis; li rajdis ĉevalon dum horoj.

**akvomelono** granda globforma frukto kun sukplena karno (*Citrullus lanatus*).
**bieno** kampara posedaĵo, ofte granda.
**distanco** kiom proksime aŭ malproksime.
**glata** (surfaco) tre ebena; okazanta sen malhelpoj.
**glate** je glata maniero.
**jesi** diri jes, respondi jes.
**jeso** ago jesi.
**krevi** subite rompiĝi pro interna tro granda premforto.
**-op-** en grupo de...
**oportuna** bona laŭ la cirkonstancoj.
**rajdi** sidi sur iranta besto.
**sabato** tago de la semajno inter vendredo kaj dimanĉo.
**sesope** en grupo de ses.
**sovaĝa** en la natura stato.
**ŝoseo** vojo por veturiloj.
**ventro** parto de la korpo, en kiu estas la stomako kaj la intestoj.
**zoo** mallongigo de “zoologia ĝardeno”.

# 7 Duboj

Je la sekva sabato finfine Mateo iras al la cirko. Komence Mateo ofte rigardas al ĉiuj direktoj. Li ege volas renkonti sian kolegon Barbara. Ekster la cirko estas granda loko kun pluraj ludiloj, beleta amuzparko. La ludiloj funkcias ĝis la spektakloj eki. Barbara ne estas en la amuzparko. Tamen pro la ludiloj Mateo rapide forgesas pri Barbara. Tre plaĉas al li boato kiu flugas. Ĉefe ĉar ĝi ŝajnas al li danĝera.

Jen la spektakloj ekas. "Eble ŝi partoprenos en iu spektaklo" li pensas. Li ne certas pri tio. Dum la spektakloj Mateo multe ridas. Je la fino Mateo rememoras pri Barbara. Tiam li scias, ke li ne renkontos ŝin je tiu tago. Li bedaŭras tion.

Dum la dimanĉo Mateo pensadas pri destino. Estas malfacile pensi pri tio.

Eŭĵeni petas Mateon iri al la domo de onklino Ana. Ana loĝas ne malproksime de ilia domo. Mateo devas kunporti ovojn al Ana. Eŭĵeni kutime donacas ovojn kaj fruktojn el la korto. Mateo iras sole.

Kiam Mateo alvenas al stratangulo, li rigardas du stratojn. Eblas iri laŭ unu aŭ laŭ alia. Mateo ekiras laŭ la unua. Tiam li iras malrapide kaj subite li haltas. Li revenas al la stratangulo. Tiam li demandas sin: "Ĉu vere ekzistas libro pri mia tuta vivo?". "Ĉu

per la libro oni scias pri ĉio, kion mi ankoraŭ faros?”. “Eble en la libro estas: Mateo iras laŭ strato Piracema. Sed mi iros laŭ la strato Getulio Vargas”. Kaj Mateo ekiras laŭ la dua strato. Post kelkaj paŝoj li haltas. “Ĉu tie oni legas tion?”. Eble kiam Eŭĵeni naskis Mateon, la libro jam estis preta. Eble sur iu paĝo de la libro jam estis legebla:

*Mateo malrapide ekiras laŭ strato Piracema, li haltas, li revenas al la stratangulo kaj pensas pri ĉi libro. Mateo ne volas kredi je ĉi libro. Tial li iras al Ana laŭ strato Getulio Vargas, kaj li donas la ovojn al Ana. Do ĉi libro estas prava.*

Mateo ja ne volas kredi je la libro. La libro povas ekzisti, tamen li ne volas fari nur tion, kio estas en la libro. Mateo revenas al la stratangulo kaj rapide iras laŭ strato Piracema. Li ne volas pensi pri la eblo, ke en libro oni antaŭlonge skribis ĝuste tion, kion li ĵus faris kaj pensis, ke en libro oni antaŭlonge skribis pri liaj agoj ĝuste tiel, kiel ili ĵus okazis. Ankoraŭ pasos kelkaj jaroj ĝis kiam Mateo povos havi firman kaj propran ideon pri tiu afero.

Je tiu dimanĉo Ana invitis ĉiujn familianojn manĝi ĉe ŝi. Mateo eĉ ne revenas al sia hejmo, lia tuta familio iras al la domo de onklino Ana. Post la tagmanĝo li, liaj gefratoj, liaj gekuzoj kaj geknaboj najbaraj ludas kune dum horoj.

Vespere Mateo estas laca pro la plena tago. Li eĉ ne emas spekti televidilon, kiel kelkfoje li faras post vespermanĝo. Li tute ne pensas iri al la strato. Li eĉ memoris pri Novuleto, Heliumo kaj aliaj amikoj, tamen li estas laca. Li ekparolas al sia panjo.

— Ĉu Dio scias tion, kion oni ankoraŭ ne faris? — Mateo demandas.

— Jes, kara — respondas Eŭĵeni.

— Ĉu ne ekzistas libera volo?

— Jes, ĝi ekzistas — asertas Eŭĵeni.

— Kiel do? Kiel Dio povas scii?

— Estas mistero. Dio ja scias — Eŭĵeni diras serioze.

Tiam Mateo iras al la dormoĉambro. Antaŭ ol dormi li ege deziras ion. "Se tiu libro ja ekzistas, mi volas tralegi ĝin". Lia kapo estas plena je duboj. Liaj duboj rilatas ankaŭ al Barbara. Tuj poste li dormas.

**amuzparko** parko por amuzado; amuzejo.
**aserti** firme diri, ke io estas vera.
**boato** malgranda aŭ ne tre granda akvo-veturilo.
**destino** vivo-vojo, kiun oni antaŭe difinas.
**donaci** doni senpage (ion al iu) por plezuro aŭ ĝojo.
**frukto** parto de vegetaĵo, kiu enhavas semojn: citrono, pomo, banano, oranĝo kaj vinbero estas fruktoj.
**inviti** peti iun veni ien; peti sen devigo; peti iun fari ion.
**spekti** rigardi kaj aŭskulti tion, kion oni prezentas en teatrejo, kinejo, cirko ktp.

# 8 Parolado dum paŭzo / Glaciaĵo

Dum la paŭzo je la sekva lundo Mateo kaj Barbara ne estas ĉe sam-klasanoj. Ili estas proksime unu de la alia. Ĉe ili estas aliaj geknaboj, kiuj brue ludas.

Barbara rigardas lin kaj salutas lin.

— S!

— S! — salutas Mateo.

— Hieraŭ mi finfine iris al la cirko. Mi esperis renkonti vin, sed tio ne okazis — rakontas Mateo.

— Hieraŭ oni iris al rivereto, al Kapim Branko, oni piknikis tie.

— Ej ulo! Mi kelkfoje iras al tiu rivereto. Estas bonege — laŭte parolas Mateo.

— Ja. Mi multe naĝis. Ĉiuj ŝategis la lokon. Ĉu vi ŝatas naĝi? — demandas Barbara.

— Mi ankoraŭ ne bone naĝas. Mi ankoraŭ lernas naĝi. Ne ĉiam mia patro povas iri kune kun mi al naĝejo. Mia patrino ne scipovas naĝi. Mi ne povas iri al naĝejo se mia patro ne iras kune.

— Eĉ ne se alia grandulo, se iu responsulo iras kune kun vi, ĉu?

— Tio malofte okazas. Iam onklo mia el alia urbo kondukis min

kaj aliajn malgrandajn parencojn al Kapim Branko. Ni ankaŭ faris piknikon tie — rakontas Mateo.

— Lukse! — Barbara krietas.

Barbara kaj Mateo pluparolas. Barbara rakontas, ke ŝi nur malofte partoprenas en spektakloj. Ŝi ankoraŭ lernas pri kelkaj aferoj de la cirko. Aliaj samklasanoj iliaj alvenas por kunbabili. Tuj poste ĉiuj reiras al la klasĉambro.

***

Je la sama tago Mateo vizitas onklinon Sebastiana. Apud la domo de Sebastiana estas glaciaĵ-vendejo. Tiam li pensas: Mi povus inviti Barbaran al la glaciaĵvendejo. Tamen li ne kuraĝus fari tion. Li scias, ke li ne kuraĝus. Do li planas aĉeti glaciaĵon por ŝi. Ja li kuraĝus donaci glaciaĵon al ŝi. Tamen li pripensas du gravajn problemojn. La glaciaĵo ne plu ekzistus, kiam li alvenos al ŝi, pro la tempo de la aĉeto ĝis la donaco. Aliaj samklasanoj certe vidus lin dum la donaco, kaj oni mokus lin.

Mateo iras al la glaciaĵvendejo. Tie laboras du amikoj: Junior kaj Tim. Kiam Mateo eniras, la du amikoj sin rigardas kaj ekridegas.

— Saluton!, Mateo — diras Junior dum Tim ankoraŭ ridas.

— S! — salutas ilin Mateo.

— Mateo, oni ordonis al ni permesi al vi manĝi tiom da glaciaĵo, kiom vi povos gluti. Vi manĝu laŭvole, kaj pagos nenion — klarigas Tim.

— Kiu? Kiu faris tion? — Mateo demandas.

— Ni ne bone konas ŝin. Ni pensas, ke ŝi estas el familio Trinidade.

Tamen ŝi ordonis. Kiun vi volas komence? Estas glaciaĵo el vinbero, ananaso, gujavo, marakuĵo...

— Sed kial? — demandas Mateo, kiu ne memoras ion ajn pri la vorto Trinidade.

— Mi ne scias — diras Tim.

— Nun vi rajtas manĝi libere. Vi nur ne povos kunporti el ĉi-tie, aŭ manĝi je alia horo aŭ tago — diras Junior.

— Bonvole, unu el ananaso! — petas Mateo.

La tri uloj manĝas (la du vendistoj ankaŭ manĝas). Ili parolas ridindaĵojn dum ili manĝas kaj ridas. Dum Mateo manĝas glaciaĵon li pensas: gajni glaciaĵon laŭvole estas afero de bildrakonto. Mateo ankoraŭ ne tiel bone konas la du ulojn, li ne scias kiel ŝerce kelkfoje ili agas. (La du vendistoj ankaŭ ŝatas legi bildrakonton.)

**ananaso** ŝajn-frukto de ananasujo.
**ananasujo** genro el familio bromeliacoj (*Ananas*).
**bildrakonto** rakonto prezentata precipe per bildoj.
**glaciaĵo** frandaĵo farita el sukero kaj glaciigita kremo.
**gluti** traigi el buŝo tra gorĝo al ezofago.
**gujavo** tre aroma frukto de gujavujo.
**gujavujo** varmlanda arbo el familio mirtacoj (*Psidium guayava*).
**lukse** esprimo por "ege bone".
**lukso** havado aŭ uzado de multe-kostaj, nenecesaj, plezurigaj aferoj.
**lundo** tago de la semajno inter dimanĉo kaj mardo.
**marakuĵo** frukto de pasifloro[a]; pasiflorofrukto.
**pasifloro** genro (*Passiflora*) el familio pasifloracoj (*Passifloraceae*).
**pikniki** fari ekskurson kaj senceremonian manĝon en la naturo.
**pikniko** eksterurba plezura ekskurso aŭ promenado, dum kiu oni senceremonie komune manĝas en plena aero.
**responsi** zorgi pri taŭga plenumo de io.
**responsulo** responsa ulo.
**vinbero** frukto, el kiu oni faras la vinon.

[a]Pasifloro enhavas ĉirkaŭ 500 speciojn. La ĝenerala frukto de pasifloro estas marakuĵo. Por frukto de *passiflora edulis* oni uzas la vorton grenadilo, aŭ grenadilofrukto.

# 9 En la domo de Marcelo

Ankoraŭ je tiu semajno en la klaso okazas grupaj prezentadoj pri diversaj temoj rilate al sano. Mateo estas feliĉa. Kial? Divenu! Jen la aliaj uloj de lia grupo: Marcelo, Marko kaj la gefratoj Barbara kaj Vilhelmo.

Ĉiuj, el grupo de Mateo, akordas pri labora kunsido en la domo de Marcelo. Tie ili devas grupe pretigi prezenton pri purigado de akvo. Ne temas ĝuste pri purigado de akvo de la urbaj akvoservoj, kiu servas akvon al la domoj. Temas pri kelkaj metodoj, per kiuj eĉ hejme oni povas purigi akvon, kiun oni trinkos. La kunsido okazos je la dua horo posttagmeze.

Je la tago de la kunsido Mateo iras al la domo de Marcelo. Dum la iro li renkontas Markon. La du knaboj alvenas kune al la domo de Marcelo. Ili alvenas je kvarono antaŭ la dua horo posttagmeze. Post minutoj la gefratoj alvenas. Je la dua horo ĉiuj eklaboras.

Ili legas librojn pri la temo, ili zorgas pri la klarigoj, kiujn ili donos al la samklasanoj, ili pretigas afiŝojn kun ilustraĵoj ktp.

Je la kvara horo la patrino de Marcelo primetas la tablon kaj vokas la geknabojn por lunĉo. La patrino de Marcelo foriras, en la domo restas nur la geknaboj kaj Tulio, la pliaĝa frato de Marcelo. Ĉiuj ili babiladas dum lunĉado. Post la lunĉado nur Marcelo kaj Barbara pridemetas la tablon. La aliaj uloj babilas.

— Ĉu vi ĉiuj volas vidi katidojn? — invitas Tulio.

Preskaŭ ĉio estas preta pri ilia prezentado. Nun ili eĉ ne plu bezonas grupe labori pri tio. Do ili jesas.

La katidoj estas en najbara korto. La najbaroj ne estas hejme. Ankaŭ la patrino de la katidoj ne ĉeestas. La katidoj ploras. Do ili kaŝe iras al la katidoj. Unu helpas la alian pasi sur la ĉirkaŭmuro. Jen granda aventuro por ili.

Ili kunportas lakton al la idoj. Tie estas sep katidoj: kvar iĉoj kaj tri inoj. La katidoj ne multe emas trinki la lakton. La geknaboj ludas kun la katidoj dum kelkaj minutoj. Tuj poste la geknaboj revenas. Ili timas, ke iu alia eksciu pri ilia aventuro.

— Ĉu katiĉo ofte vizitas la idojn? Kiu estas ilia patro? — demandas Marko.

Tulio ne scias la respondojn. Li nur konas ilian patrinon.

Post la reveno la katidoj plu ploras. Marcelo kaj Tulio promesas zorgi pri la katidoj, se fakte la najbaroj aŭ la patrino de la katidoj ne revenos.

La prezentado de la grupo je la sekva tago estas plene sukcesa.

**akordi** esti en akordo.
**akordo** sameco de sentoj aŭ opinioj inter du aŭ pli da personoj.
**aventuro** danĝera aŭ plezura (neatendita) vico da okazaĵoj.
**ilustraĵo** desegno, kiu helpas nin kompreni ion.
**lakto** likvo el mamo de homo aŭ besto, kiun trinkas tre juna ido.
**lunĉi** manĝi lunĉon.
**lunĉo** intermanĝeto; neformala, neabunda manĝo, okazanta inter la precipaj manĝoj, ekzemple paŭze dum laboro.
**primeti tablon** meti manĝilaron sur tablon por manĝado.
**pridemeti tablon** demeti manĝilaron de tablo post manĝado.

# 10 Multo da novaĵoj

Dum la semajnfino Mateo eĉ provas iri al cirko je dua fojo, tamen li ne sukcesas. Li volegas iri al la cirko, tamen neniu povos helpi lin. La gepatroj vojaĝos, aliaj geparencoj havas okupojn.

Kelkaj geparencoj partoprenos en fiŝkaptado de sabato ĝis dimanĉo. Mateo neniam partoprenis en fiŝkaptado. Do li petas partopreni en la fiŝkaptado. Lia onklo Adamo timas, ke Mateo ne eltenos la restadon ĉe la rivero. Eŭĝeni ne permesas: "Vi ankoraŭ estas eta por tio" ŝi diras.

Do Mateo malĝojiĝas.

— Mi ne povas iri al la cirko. Mi ne povas fiŝkapti. Kion mi povas fari? Mi povas fari nenion — ploretas Mateo.

Post iom da parolado oni permesas Mateon partopreni en la fiŝkaptado.

Ĉiuj geparencoj el la urbeto tagmanĝas kune je ĉi sabato. Eŭĝeni kaj Leonido duone tagmanĝas kaj hastas al la stacidomo, la buso foriras akurate je la dek dua horo. Ili revenos nur lunde.

Post la tagmanĝo oni kontrolas la aparatojn por la fiŝkaptado kaj por tranoktado. Al fiŝkaptado en rivero Aragvajo iras Mateo kaj parencoj liaj: du onkloj, tri kuzoj kaj la frato. Nelonge post la

tagmanĝo ili ekveturas al la rivero.

Ĉe la rivero Mateo provas kapti fiŝojn. Li ne sukcesas, tamen li tute ne estas malĝoja. Iam li vidas grandan fiŝon, kiu naĝas proksime de la rivero-surfaco. La granda fiŝo tuj poste malaperas en la profundo de la rivero. La akvoj de Aragvajo ne estas travideblaj.

Dum Mateo promenetas sur la bordo de la rivero li trovas 88-papilion.

— Ej! Ĉi papilio alportas malĝustan daton — laŭte diras Mateo.

Ĉiuj ridas.

— Jam 2004as!

— Tio ne estas dato — la onklo Flozino klarigas al li — ĝi jam havis tiun desegnon antaŭ la 1988a jaro, same tiel ĝi havas ĝin post la 1988a jaro.

Nokte Mateo dormas milde dum kelkaj uloj ankoraŭ fiŝkaptas kaj aliaj uloj babilas ĉe fajro. Ili havas hamakojn. Pro la bela sennuba ĉielo ili rezignis pri tendoj. Nokte kuloj ĝenas neniun.

Je la mateno de dimanĉo ili jam havas sufiĉe multe da fiŝoj. Tiam ili foriras ree al la urbo. Posttagmeze Mateo jam estas en sia domo. Tiam Mateo havas liberan tempon. Li ne volis resti ĉe geonkloj, do zorgas pri li la frato Bino. Alico restis ĉe geonkloj.

La du fratoj manĝas pufmaizon dum la ĉielo fariĝas nigra. Bino ridetas. Jen la oportuno, kiun li atendis. Ĝi ja okazas: pluvegas dum la gepatroj malĉeestas. Bino petas Mateon resti dome dum li iras al vendejo: "Patrino petis min aĉeti ion". Mateo ja scias, ke li mensogas. Mateo scias kion Bino planas. Ne nur Mateo, ankaŭ Bino ne rajtas fari tion. Bruega pluvo falas, kaj post mallonga interparolo ili konsentas pri kion fari.

Je la unua fojo ili povas baniĝi en pluvo. Ja ili baniĝas en pluvego. Ne nur ili du, aliaj amikoj liaj alvenas por festo sub la pluvo. Ili ĉiuj sur ilia strato.

Por ilia feliĉo la pluvo estas longdaŭra.

Je la noktiĝo plu pluvas, tamen la du fratoj revenas al la hejmo. Ili baniĝas, ĉi foje en banejo. Tuj poste la gepatroj telefonas. Laŭ Bino ĉio estas enorde. Mateo ankaŭ diras tion. Ĉio estas enorde. Mateo havas multon da novaĵoj por rakonti al la amikoj morgaŭ en la lernejo.

Por la vespermanĝo Bino faras sandviĉojn. Dum la manĝado Mateo plendas. Mateo malsaniĝas pro la baniĝo sub la pluvego. Bino telefonas al Sebastiana kaj Ana. Ili venas al Mateo kaj prizorgas lin. La malsano ne estas grava, tamen ĝi malpermesas lin iri al la lernejo lunde.

Lunde Mateo vekiĝas posttagmeze. Liaj gepatroj jam ĉeestas. Li jam tute resaniĝis. Sed li bedaŭras, ke li ne povis iri al la lernejo. Li pensas pri Barbara. Li havas multon da novaĵoj.

**akurata** kiu faras aferojn je la ĝusta tempo, je la difinita horo.

**akurate** laŭ akurata maniero.

**busa stacidomo** konstruaĵo por halto de busoj, eliĝado kaj eniĝado de pasaĝeroj, ne temas pri simpla busa haltejo.

**buso** aŭtobuso.

**dato** tempo ĝenerale montrita per jaro, monato kaj numero de la tago: 1988-08-27 (aŭ 88-08-27); 1988 = 88 (88a jaro de la 20a jarcento).

**desegno** bildo farita per krajono aŭ alia skribilo sur papero; desegnaĵo.

**hamako** ŝnura reto aŭ tolaĵo, horizontale pendigita per siaj du ekstremaĵoj kaj formanta porteblan liton, en kiu oni kuŝas, aŭ sin balancas.

**hasti** agi kun nekutime, nenormale granda rapideco.

**kulo** malgranda insekto, kiu suĉas sangon kaj kies piko kaŭzas jukadon (*Culex*).

**multo** granda kvanto, granda nombro[a].

**oportuno** facilo, kiu rezultas de favoraj kondiĉoj.

**papilio** insekto kun kvar relative grandaj, ofte koloraj flugiloj (*Lepidoptera*).

**88-papilio** vidu http://lujz.org/amiko/okdekok.jpg

**puf-maizo** [**1**] la pufigitaj grajnoj de maizo[**2**], ĝenerale manĝataj per la fingroj; [**2**] speco de maizo (*Zea mays; everta*), kies grajnoj krevas kaj pufiĝas, kiam oni kuiras ilin. (Hejma Vortaro de Jouko Lindstedt[b])

**sandviĉo** du pan-tranĉoj kun io inter ili.

**stacidomo** Ĉi tie "stacidomo" estas uzata kiel "busa stacidomo".

**surfaco** supraĵo; supra aŭ ekstera flanko de.

[a] "li havas multon da novaĵoj" kaj "li havas multe da novaĵoj" bonas. "li havas multajn novaĵojn" ankaŭ bonas, ili estas samsignifaj.

[b] Hejma Vortaro
http://www.helsinki.fi/~jslindst/hejmvort.html

# 11 Finfine mardo

Finfine mardo. La suno brilas. Ĝi ĵus naskiĝis. La ombroj de la personoj estas longegaj sur la stratoj.

Alico akompanas Mateon ĝis la lernejo. Dum ili piediras sur la stratoj ankoraŭ malsekaj pro la pluvo de la frumateno, unu provas ete malsekigi la alian. Estas pluraj arboj antaŭ la domoj. Kiam estas malalta branĉo, unu batas ĝin per la mano por faligi gutojn.

Por la sukceso de la ludo ili agas hazarde. Se estas malgranda arbo, la rimedo estas malbona por la du gefratoj: unu batas la trunkon per la plando kaj tuj kuras; tiam la du malsekiĝas. La ludo gajigas la du geknabojn.

Mateo alvenas al la lernejo. Tuje li rimarkas, ke la cirko ne plu staras flanke de la lernejo. Li kuras al la terpeco. Ĝi estas malplena. Tamen ĉe ĝi ankoraŭ estas du aŭtoj, eble de la cirko. Mateo revenas al la lernejo. Li esperas, ke li almenaŭ povos adiaŭi Barbaran.

— Marcelo! Kie estas Barbara kaj Vilhelmo?

Tiam li ekscias, ke hieraŭ estis ilia lasta tago en la lernejo. Ili vojaĝis hieraŭ al alia urbo. La klaso eĉ improvizis etan adiaŭan feston.

— Barbara skribis leteron por vi. Ĝi estas en koverto, kiun Barbara fermis per gluo! Ĝi estas kun Karla — diras Marcelo.

Mateo ricevas la koverton, tamen li ne malfermas ĝin tuj. Li atendas la paŭzon. Li estas malgaja. Je la paŭzo li iras al fora loko, kie li estas sola. Li sidas sur trotuarrando. Tiam li legas la letereton.

*Mateo,*
*Bedaŭrinde vi ne ĉeestas hodiaŭ. Mi tre ŝatis mian restadon ĉe via lernejo kaj urbo. Ĝis alia tago!*

*Brakumon de via amiko Barbara*

Mateo sentas ion strangan, kvazaŭ malplenon, sed ne temas pri malsato. Alvenas Marko kaj sidiĝas apud Mateo. Tiam tuj Mateo enpoŝigas la leteron.

— Mateo, ĉu vi enamiĝis al Barbara? — demandas Marko.

— Ne. Ŝi estas mia amiko.

— Mi aĉetis tri bombonojn. Mi jam manĝis unu. Jen du. Unu estas via, la alia estas mia — diras Marko post minuto.

Mateo tenas sian bombonon en la mano. Marko rapide manĝas sian bombonon. Marko ne komprenas, kial Mateo ne manĝas la bombonon? Li ne scias, ke Mateo tute ne emas manĝi.

— Kiam vi pensas, ke tio ekkomenciĝas, tio jam finiĝas — diras Marko ankoraŭ kun la pakumo de la bombono en la mano.

Ekde la enpoŝigo de la letero Mateo ne rigardis al la amiko Marko. Mateo zorgas pri siaj pensoj kaj strangaj sentoj. Responde al lasta

parolo de Marko, Mateo nur diras “Ja”. La sonorilo sonoras, Mateo enpoŝigas la bombonon kaj ekstaras por reveni al la klasĉambro.

*fino*

**adiaŭi** diri “adiaŭ!” aŭ aliajn vortojn ĉe foriro.
**akompani** iri kun iu.
**bombono** malgranda sukeraĵo prenata kiel frandaĵo.
**branĉo** ne-ĉefa ligna parto de arbo.
**gluo** substanco, kiu post sekiĝo fiksas unu aĵon al alia.
**guto** ero da likvo; akvero.
**hazardo** okazanta sen plano, intenco, volo.
**improvizi** (tuj kaj) senprepare organizi ion.
**koverto** plata saketo el papero, en kiun oni metas leteron.
**ombro** pli-malpli plena manko de lumo, en loko, kiun maldiafana korpo ŝirmas kontraŭ la lumo.
**pakumo** kovraĵo uzata por paki.
**plando** la flanko de la piedo, kiu tuŝas la teron dum irado.
**trotuaro** irejo (ordinare tegita per ŝtonplatoj aŭ asfalto) destinita por piedirantoj, ĝenerale apud la vojo destinita por veturiloj.
**trotuarrando** rando de trotuaro.
**trunko** la ĉefa ligna parto de arbo.

# Livros Grátis

( http://www.livrosgratis.com.br )

Milhares de Livros para Download:

Baixar livros de Administração
Baixar livros de Agronomia
Baixar livros de Arquitetura
Baixar livros de Artes
Baixar livros de Astronomia
Baixar livros de Biologia Geral
Baixar livros de Ciência da Computação
Baixar livros de Ciência da Informação
Baixar livros de Ciência Política
Baixar livros de Ciências da Saúde
Baixar livros de Comunicação
Baixar livros do Conselho Nacional de Educação - CNE
Baixar livros de Defesa civil
Baixar livros de Direito
Baixar livros de Direitos humanos
Baixar livros de Economia
Baixar livros de Economia Doméstica
Baixar livros de Educação
Baixar livros de Educação - Trânsito
Baixar livros de Educação Física
Baixar livros de Engenharia Aeroespacial
Baixar livros de Farmácia
Baixar livros de Filosofia
Baixar livros de Física
Baixar livros de Geociências
Baixar livros de Geografia
Baixar livros de História
Baixar livros de Línguas

Baixar livros de Literatura
Baixar livros de Literatura de Cordel
Baixar livros de Literatura Infantil
Baixar livros de Matemática
Baixar livros de Medicina
Baixar livros de Medicina Veterinária
Baixar livros de Meio Ambiente
Baixar livros de Meteorologia
Baixar Monografias e TCC
Baixar livros Multidisciplinar
Baixar livros de Música
Baixar livros de Psicologia
Baixar livros de Química
Baixar livros de Saúde Coletiva
Baixar livros de Serviço Social
Baixar livros de Sociologia
Baixar livros de Teologia
Baixar livros de Trabalho
Baixar livros de Turismo